

Leterkesto, 3a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 431 1972.01.12 & 15

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Por esprimi agrablan novan jaron al niaj geaŭdantoj ni remalfermas nian leterujon, en kiu nun troviĝas salutvortoj venintaj el 18 eŭropaj landoj : Belgio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanioj Okcidenta kaj Orienta, Hungario, Italio, Jugoslavio, Nederlando, Norvegio, Pollando, Portugalio, Svedio kaj Svislando.

A.- Koncerne nian prelegaron pri la okdekjariĝo de la granda poeto Kálmán Kalocsay skribis sinjoro Anton Kronshage en Schwelm, Germanio Okcidenta. Li rememorigas, ke li renkontis nin en Feriosemajno okazinta en Vieno en 1958. Fakte tiuj Ferio-semajnoj, kiujn organizis Hugo Steiner, restis por ni imitenda modelo : ĉio glate funkciis, multon oni vidis sen neniam ricevi la impreson havi tro ŝarĝitan horaron.

Cl.- Sinjoro Tom Mathieson en Skotlando, kiu ŝatis niajn prelegojn pri Kalocsay, donas klarigojn pri la nomo de nia verkisto William Auld, kies artikolon ni parte citis. Jen ni legas tiun interesan leteron sen esti certaj bone prononci la anglajn vortojn :

A.- « *Hieraŭ vespere, mi aŭdis la radian elsendon pri Auld kaj Kalocsay. Bonvolu pardoni min, ke mi atentigas vin pri la prononco de la skota vorto **Auld**. La prononco ne troviĝas en Esperanto, tamen ĝi sin trovas en la angla vorto **bald**. Forprenu la literon **b** kaj jen **auld**. La prononco **aŭld** estas malĝusta. La vorto signifas en la skota lingvo : maljuna, malnova aŭ antikva. En la angla lingvo ĝi ne estas. La skota kanto « Auld lang syne », nun estas mondkonata. La traduko de Motteau estas « Pasintaj Tagoj » kaj tiu de Rossetti estas « La Iamo longe for ».*

Cl.- Dankon pro tiuj kelkaj klarigoj, kiuj eble interesis kelkajn geaŭdantojn, kvankam ni tre verŝajne denove fuŝprononcas la anglajn vortojn. Ha tiu angla prononcado estas terura por neangloj.

A.- Sinjoro Walter Kaukal en Neustadt (Weinstrasse, Germanio Okcidenta) estis interesata de niaj rakontoj pri la esperanto-vivo en diversaj grupoj de Svislando. Same multaj aliaj geaŭdantoj, kiuj rakontis al ni lokajn okazaĵojn, kiuj pruvas al ni, ke la grupa vivo ĉie iomete similas. Oni samtempe baraktas por diskonigi esperanton kaj por krei amikaran atmosferon, du aferoj malfacilaj.

Cl.- Sinjorino E. Kohler en Besançon, Francio, ofte surbendigas radio-prelegojn, inter ili la niajn. Poste ŝi aŭskultigas ilin al kursanoj kaj grupanoj. Kiel multaj geaŭdantoj ŝi legis kun intereso la specimenajn ekzemplerojn de *Svisa Espero*, kiujn ni aldonis al nia unua cirkulera letero sendita al niaj skribemaj geaŭdantoj. Pro tio ni aldonis novan specimenan ekzempleron de *Svisa Espero* al nia novjara cirkulero. Sinjorino Kohler deziras scii la abonprezon. Ĝi estas je 15 svisaj frankoj jare.

A.- Koncerne la konkurson, kiu okazis la pasintan jaron, kaj kies ĉefpremion gajnis sinjoro Henry D. Palmer en Bristol, Britio, unu el niaj fidelaj aŭdantoj, pluraj personoj skribis. Ili preskaŭ senkulpiĝis ne esti konkursintaj. Fakte ne ĉiuj antaŭvidis eblecon povi ferii dum la monato majo. Ni deziras al sinjoro Palmer bonan vojaĝon al Lugano : ne ĉiam en Esperantio oni profitas pri senpaga vojaĝo tra Eŭropo kaj pri senpaga restado dum grava kongreso.

Cl.- Pluraj orienteŭropanoj petas al ni ĉiam sendi niajn dokumentojn en fermitaj kovertoj. Ili sciu, ke tio estas ege kosta afero. Ĝenerale niajn presaĵojn ni presaĵe dissendas. Ni tre bedaŭras, ke en iuj orienteŭropaj landoj la presaĵaj dokumentoj tiel malfacile atingas sian celon. En tiuj landoj devus ekzisti pli forta kontraŭstaro al la rajto, kiun prenas la poŝtoŭfice por ne liveri presaĵojn. Tio fakte estas kontraŭa al la universalaj poŝtaj reguloj, kiujn ĝenerale subskribis ĉiuj registaroj en la mondo.

A.- Vi sciu, ke ĉiuj personoj, kies nomojn ni prononcis dum tiuj tri leterkestaj elsendoj ricevis aŭ estus devintaj ricevi novjaran cirkuleron kun du dokumentoj : leciono programita kaj specimeno de *Svisa Espero*. Nur la modereco de la presaĵtarifo permesas similan informan agadon pri la esperanto-vivo en Svislando.

Cl.- Kaj nun en la restanta tempo ni deziras saluti la personojn, kies nomojn ni ne ankoraŭ menciis ĝis nun.

A.- En Belgio ni salutas fraŭlinon Imelda Wuyts en Mortsel.

Cl.- En Britio sinjoron John Baron en Darwen, sinjoron W. Dalton en Norfolk, sinjoron Gregor en Northampton, sinjoron Henry Palmer en Bristol, gesinjorojn Alice kaj Walter Peake en York.

A.- En Ĉeĥoslovakio sinjorinon Marie Kvasna en Melnik.

Cl.- En Danlando sinjoron L. Friis en Abyhøj kaj liajn 30 gelernantojn kaj sinjorinon Asta Christensen en Valluj.

A.- En Finnlando gesinjorojn Eini kaj Kauno Kilpinen en Niittykumpu.

Cl.- En Francio gesinjorojn André Antoni en Hyères, Marcel Maillot en Héricy, Lemaire en Lyon, Roy en Vesoul kaj Gaston Vidal en Chamalière.

A.- Restas ankoraŭ tro da salutendaj personoj, por ke ni finu tiun salutadon hodiaŭ. Ni deziras fini gratulante tute speciale la informojn PILO-Press. Semajnon post semajno pere de la informilo, kiun redaktas sinjoro Ludwig Pickel en Nürnberg, ni ricevas freŝajn novaĵojn pri la esperanto-vivo. Regule sinjoro Pickel raportas pri niaj elsendoj kaj tiuj de aliaj Radio-Stacioj. Tio signifas, ke li ne nur aŭskultas, sed samtempe provas resumi la enhavon de tiuj radioprelegoj. Ni tre esperas, ke Sinjoro Ludwig Pickel trovos la fizikajn fortojn daŭrigi tiun utilan informadon, kaj ke kreskos la nombro de la abonantoj al tiu semajna informilo PILO-Press. Samtempe ni esperas, ke kreskos la nombro de la personoj, kiuj regule sendos al li freŝajn kaj uzeblajn informojn. Ili povas havi certecon, ke tre rapide tiuj novaĵoj estos diskonigataj.

Cl.- Vi aŭdis babiladon el Svislando. La venontan semajnon, okaze de lasta babilado kun niaj geaŭdantoj, ni malplenigos nian leterujon. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!